


Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://www.distrito.com/esperanto/k39.htm>

<http://www.dragonfire.net/~Esperanto/k39.htm>




La homo kiu
ŝanĝis la
muzikon de la
jarcento 20-a

Heitor Villa-Lobos

N° 39

Julio/Septembro 1998

Kajeroj — el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: María del Mar Guirao Gallego
 Avd^o Juan Carlos I, 22-8^o-H,
 30800 LORCA (Murcia)
 Hispanio.

Sekretario: José Pina Tuells,
 c/ St^a Teresa, 22-2^o CD,
 ES30005 MURCIA

Libroservo: Nicolás Gil Carballo,
 Apartado 305
 ES24080 LEÓN

Redaktoro: Jesuo de las Heras,
 Apartado 4461
 ES30080 MURCIA

Vicprezidanto: Ankoraŭ neniu oficas.

Kasisto: José María Bernabéu Franco
 Gral. Primo de Rivera, 8
 E-03360 Callosa de Segura,
 ALICANTE (Hispanio).

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la nova konto
 n^o 1302 0412 86 0022655110 en libreta de Caja
 Postal. Sen aldona kosto. La abono kostas 1000
 pesetojn aŭ 6 eŭrojn. Kvintancon oni ricevos.*

*Pretigas la Kajeron:
 Provkorekto: José Pina Tuells,
 Administro: Juan Antonio Cabezas Martínez,
 Redakto: Jesús de las Heras Jiménez.*

Kovrilo: Jen la homo, kiu verkis pli ol 3 000 muzikajn pecojn dum sia vivo. Vera laboristo de muziko, Héitor Villa-Lobos, ci ĉiam vivos en niaj koroj.

Oni povas reprodukti artikolojn, kondiĉe ke oni citu la originon.

Enhavo

Redaktore	3
Informoj de la Prezidanto	4
Akto de la lasta kunveno de HALE	5
Ĝurgura	7
KJD!	9
SOCIO, SOCIALA, SOCJETO	11
Valjadolido, mia amo!	13
Heitor Villa-Lobos: perspektivo al lia gitarmuziko	17
La spirito de Majo 1968	30



Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mis-traktas iun ajn personon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.

Redaktore:

Ni ĥotas, muzikas, kaj ploras...

Ni iris al la lasta Kongreso de la Hispana Esperanto Federacio, kaj ĥotis. Bonan praktikadon de Esperanto ni havis tie, kaj ni esperas, ke venontjare en Kasteljono ni renkontos niajn amikojn kaj kamaradojn denove. Vi trovos mian vidaĵon pri la kongreso 57-a en la sekvantaj paĝoj, kiujn la apuda foto anoncas.

Mi fiere anoncas artikolon de Orlando Fraga pri Héitor Villa-Lobos, memfarita muzikisto brazila, kies persona laboro turnigis muzikon por hispana gitaro. Eble oni opinios, ke estas ĝi tro longa artikolo, sed taŭgas —laŭ mi— dediĉi tiom longan spacon al laboristo pri muziko tiom alkvalita. Vi aŭskultu sian *Kvin preludojn* por gitaro, kaj vi vidos.

Kamarado Antonio Marco Botella priskribas al ni la spiriton de Majo 1968, kaj Giordano Moya difinas diferencon inter *socio*, *sociala kaj societo* en paĝo 11-a.



Ni finas nian serion pri kutimaj ĝenantaj demandoj kaj respondoj pri Esperanto. Kvankam ili entutas tridek, la serio restas malfermita, kaj sekve vi povas plialtigi la nombron, se vi ne trovis vian demandon aŭ sedon tie. Bonvolu sciigi al ni.

Manolo, nova kolaboranto de nia revuo, artikolrecenzas pri tiu mirinda denoncanta libro, *Vualo de*

I'silento, kiu nepre nutros vian penson, se vi legas ĝin. Laŭ li, temas pri malliberigo socia ne nur kontraŭvirina.

Dum la Kongreso de HEF okazis Kunveno de HALE, kies akton vi trovos ĉe paĝo 5-a, kaj la ĝisnuna prezidanto, kamarado Marteno Bustín Benito, nerevokeble demisiis. Pri tio nia nova prezidanto, María del Mar Guirao Gallego, parolas al ni en la sekvanta paĝo. Mi esperas, ke ni ĉiuj helpos ŝin plibonigi nian asocion kulturalan.

Laboron kaj sanon,

La redaktoro.

Informo de la Prezidanto

Saluton, haleanoj!

Mi estas nova prezidanto hazarde kaj tute neatendite, ĉar mi ne iris al Valjadolido...



Mi devas konfesi, ke kiam mi akceptis proponon de Kamarado Marteno Bustín al vicprezidanteco, mi ne imagis, ke li demisius tiom frue, lasante al mi sian postenon. Mi ne volas esti prezidanto. Mi ne ŝatas esti prezidanto. Mi ne scias esti prezidanto. Sed mi klopodos esti vian prezidanton ĝis kiam nova kamarado alprenos tiun ĉi gravan respondecon, aŭ ĝis la venonta monato de aprilo, kiam mi nerevokeble prezentos mian demision antaŭ vi ĉiuj pere de ***Kajeroj el la Sudo*** aŭ kunveno, kiun mi alvokos.

Mi malfermas la limtempon, por ke oni kandidatiĝu al posteno de Prezidanto de HALE, kortuŝa asocio de ni ĉiuj amata, kiu ne meritas morton pro manko de prezidanto, bedaŭrinde.

Kamaradece,

María del Mar

Akto de la lasta kunveno de HALE

HALE kunveno okazis la 1-an de majo de 1998 je la 20:20 ĉe kafejo ***La Oficina*** (Oficejo) de Valladolid, apude de la Kongresejo 57-a de HEF, kun ĉeesto de la sekvantaj kamaradoj:

Ana Manero,
José María Sarasúa,
José María Bernabéu,
Miguel Fernández,
Juan Antonio Cabezos,
Martín Bustín,
David Trigo,
Francisco Conejero,
Giordano Moya,



Jesuo de las Heras, agante kiel eventuala sekretario pro neĉeesto de Sekretario José Pina Tuells.

La tagordon prezentis nia prezidanto tri horojn antaŭ la kunveno, kiu disvolviĝis jene:

1 Legado de akto kaj eventuala aprobo. Oni unuanime aprobis ĝin.

2 Legado kaj eventuala aprobo de BILANCO JARA. Nia kasisto José María Bernabéu informis, ke estas **64 368 pesetojn**, krom lasta pago de Francisco Conejero. Kotizoj al HALE ankoraŭ malabundas.

Ni aprobis la kontojn de HALE.

3 Resumo de aktivadoj post nia Asembleo de Valensjo. Ni ne povis starigi kursojn en sindikatejo en Alikanto. Tamen, ni sukcesis starigi kurson en Ateneo *Apoyo Mutuo* (Reciproka subteno) de CNT de Beniaján (Mursjo) kun 8 gelernantoj. Miguel Fernández diras, ke oni petis al li gvidi kurson ĉe ***El Solidario***, bulteno de *Solidaridad Obrera* (frakcio de CNT), sed li ne povis tion fari pro troo de aktivaĵoj. Anstataŭe, li prelegis pri Esperanto, ege sukcese.

4 Informo pri Kajeroj el la Sudo. La redaktoro klarigas, ke nia bulteno prokrastis sian aperon ĉi foje je la unua fojo unu monaton, ĉar anstataŭ aperi la 1-an de majo, ĝi devus esti aperinta la 1-an de aprilo. Tio estis pro tro da laboro, kion li klopodos ne okazigi en la estonto. Kvankam ne multaj kamaradoj enhavas tiun *dian sparkon* verki, oni daŭre sendas kontribuadojn al ***Kajero***, ĉefe tra Inter-reto.

Neniu demandis pri nia bulteno, kiun oni disdonis al anoj de Hale dum la dua tago de la Kongreso de HEF.

5 Programo por la venonta periodo. Estas tre interese, ke liberecanaj junuloj interesiĝas pri Esperanto. Post multjara silento, ni havas nun rilatojn kun aliaj leaĵoj. Nun la afero funkcias bone. Sed kun SAT ni ne rilatas kiel asocio, kion ni devas fari laŭ la prezidanto. Ni devus kontribui al Lea Komitato minimume per 10 000 pesetoj, laŭ propono de Kasisto Bernabéu. Oni plejmulte konsentas (fakte ĉiuj jesas al tio, nur unu homo sindetenas).

6 Proponoj kaj kritikoj al SAT pri la Kongreso de Odeso. Neniun kritikon oni diras.

7 Nepra eksiĝo de la nuna prezidanto kaj elekto de sia anstataŭanto. Prezidanto Bustín diras, ke li demisias ĉar li ne plu deziras okupi sian postenon. Oni akceptis tion post multe da diskuto, dum kiu ni aŭdis ĉefe la voĉojn de kamaradoj Bustín, Fernández kaj de las Heras. Finfine, oni decidis, ke laŭstatute Vicprezidanto Guirao iĝas aŭtomate nia Nova Prezidanto, al kiu restas la respondeco pri la nuna situacio.

8 Petoj, sugestoj kaj demandoj. Subskribanto petas, ke k-do Bustín re-prezidantiĝu, aŭ ke li almenaŭ vicprezidantiĝu. Li rifuzas duoble.

Ne estante pliaj aferoj por pritrakti, ni finis nian kunvenon je la 21:00 horo.



Eventuala Sekretario,

Subskribis Jesuo de las Heras Jiménez.

Ĝurĝura

*La kulturo estas la juvelo de la popoloj, ĝia hereda posedaĵo. Ĝi riĉigas laŭ historia evoluo, sed ĝi devas resti vivanta ekde sia origino en ĉies memoro... Male, la tradicioj estas aro da kutimoj, bonaj aŭ malbonaj, kiuj necesigas grandan refreŝigon, se oni volas akcepti la progreson. (Ĝura: **Vualo de l' silento**, paĝo 138).*

Mi ĵus legis libron pri tradicia brutalismo en Alĝerio, kies viktimo estas ĉefe virinaro, sed ankaŭ viroj estas subpremataj de ĝi. Ĝi tute ne permesas al ili amo, komprenemo, vera familia vivo. Knabino ne povas elekti sian vivon, sed patro aŭ frato unue, kaj edzo poste, faras tion. Se ŝi ne konsentas, oni povas mortigi ŝin, kaj batado virina estas en natura senco de aferoj tie. La libro priskribas vivo en Berberio, parto de Alĝerio kaj unu el la du kulturoj kiuj estas en la lando, kune kun la araba. Kvankam Ĝura, la verkistino, ne parolas pri religio, oni ne povas ne pensi pri muslima etoso, al kiu oni kutime agnoskas tiun virinsubpre-




madon. Tamen, Muhamadun, en sia **Korano**, diras:

O, tiujn, kiuj kredas! Ne laŭleĝas, ke vi ricevas heredaĵe virinojn kontraŭ sia volo, kaj ankaŭ devigi ilin ne reedziniĝi por konservi parton, kiun vi donacis al ili, se ili ne evidente turpigiĝis. Traktu ilin laŭ tio, kion oni decidis. Se vi malamas ilin, vi eble malamas ion, en kio Dio metas grandan bonon. (Al-Koran', 4-23/19).

Kompreneble, ne ĉiu, kiu legas tiujn vortojn en la *araba litera*, komprenas ilin. Alimaniere oni ne povas kompreni kiel nome de *tradicio* oni mistraktas knabinojn en arabaj landoj, kaj ankoraŭ pensi, ke ili agas laŭplace de la profeto. Plie, se oni legas Ibn-Al Arabi-n, oni ege dubas ĉu tiuj laŭdindaj vortoj pri virinoj havas ion komunan al tio, kion Ĝura priskribas en sia aŭtobiografia verko **Vualo de l' Silento**.

Ali en Mirlando estas filmo, kiun Ĝura kaj Oliver -sia amiko- faris por priskribi la situacion en sia lando. Brava filmo dokumenta, eĉ pli brava ĉar kiam ĝia aŭtorino faris ĝin, jam estis mortopeno pendante sur ŝi. Familia mortopuno, ĉar ŝi forlasis sian

domon por ne edziniĝi al viro elektita de ŝia patro sen konsulti ŝin. Ŝi ankaŭ volas helpi siajn samfamilianojn, kaj dum tio funkcias, la mortpuno estas prokrastita. Sed kiam ŝi finfine venkas ankaŭ tiun kulpigan senton kaj sendependas el sia familio ankaŭ *deve* kaj *mone*, oni fakte provas mortigi ŝin, ŝian edzon kaj ŝian naskontan bebon. Nenio malsimila al aliaj kulturoj aŭ tradicioj: mono ĉion povas. Se mono ne plu estas, malamo revenas.



Oni kutime aŭskultas en okcidento, ke *virinoj devas provi sian valoron multe pli ol viroj antaŭ ol ili atingas altan postenon*. Bone, mi ne scias, ĉu ĝi veras -laŭ mia sperto-, sed la protagonisto de ĉi tiu rakonto ja devis fari grandan penon por ebligi sin fari decidojn kiujn neniu neigas al viro. Mohand, la frato de Ĝura, edziĝis al francino, kaj neniu protestis. Ŝi decidis edziniĝi al franco, kaj oni kondamnis ŝin al morto. Feliĉe, ŝi profitas la francan etoson kaj kulturon por fari tiun denoncon, tiun klarigon pri kio okazas en Alĝerio -kaj eble en multaj aliaj lokoj en la mondo- kontraŭ

virinoj. Scii estas parto de solvo. Sed eĉ post ŝi faris filmon klarigante la aferon, fari filmojn estas multekosta kaj atingas ne multe da homoj, se estas cenzuro. Kanto estas pli libera kaj pli foratinganta. Tial ŝi starigis kantan kaj dancan grupon, nomitan *Ĝurguran*, laŭ devizo *kanti pri tio, kion ŝiaj avinoj prizumis*. La 23-an de januaro de 1978 Ĝurgura debutis en l' Olimpja Teatro de Parizo sukcese. Ekde tiam ili registris multajn diskojn en la berbera lingvo, per kiuj ili denoncis maljustan situacion de virinoj en Alĝerio.

Kaj oni ne povas ne pensi pri similaj okazoj en niaj okcidentaj landoj, kie estas kulto al forto, al riĉo, al nesinĝeno kaj al nepuno. Kiu defias jamkreitan maljustan etoson?

Mi konkludas, ke tiu libro, *Vualo de l' Silento*, de alĝera verkistino Ĝura, eldonita de SAT kaj atingebla kontraŭ 70 francaj frankoj kaj mendebla ĉe SAT, 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris, estas pensiga verko, kiu tute ne povas manki al librobreto esperanta.

Manolo

KFD!

27. Mi estas anglo, kaj kiam mi iras eksterlanden, ja sufiĉas al mi tiu angla flughavena kaj hotela, pri kiu vi parolas. Kial mi devus lerni Esperanton?

Pro ĉio kaj pro nenio. Se onin kontentigas kusi sub la suno kaj trinki okaze, malmankas eĉ la propra lingvo. Vojaĝi por vidi pejzaĝon kaj iun muzeon estas farebla de anglo hodiaŭa kiu ne scias lingvojn. Broŝuroj estas en la angla laŭ la tuta mondo, ĝi veras. Se oni volas demandi la turisman gvidiston, tamen, oni devas kontentigi sin per liaj aŭ ŝiaj mallongaj kaj limigitaj respondoj. Mi neniam trovis gvidistojn sufiĉe lertajn, por ke ili povus paroli en la angla pri la literaturo, arto, kaj eĉ historio de la koncerna lando, kiam mi vizitis ĝin.

Sed se okaze de via vojaĝo eksterlande, vi hazarde malsaniĝas kaj via kuracisto —fakisto pri sia metio, sed ne pri la angla— li aŭ ŝi havos problemon kompreni vin, kiam vi plendas pri pulsantaj doloroj ĉe via dorso, seko gorĝa aŭ okuljuko, eĉ pri angorsento..., ĉu vi vere kredas, ke alilandanoj havas devon kompreni ĉiujn tiujn konceptojn en la angla, por ke vi povu cirkuli tute libere kaj —ĉefe— maldanĝere laŭ la tuta planedo? Se vi havas akcidenton, kiel ajn vi povos diri vian version al policano? Se la afero komplikiĝas, evidentas, ke vi povas lui interpretiston..., sed ĉu vi scias kiom kostas nur unu horon de interpretado?

Kaj rilate al akcidentoj, la plej grava akcidento flughavena en historio okazis ĉe flughaveno Los Rodeos (Kanariaj

Insuloj) ĉar aviadistoj konfuzis imperativon (*report*) kaj substantivon (*report*) en la angla.

Esperanto ofertas al vi eblecon paroli kun alilandanaj aborigenoj ĉe tiu lando, kiu vi vizitas, pri ĉiu ajn temo kun profundceco kaj detaloj nekonataj en iu ajn alia lingvo. Paroli la gastaman lingvon estas paŝi pluen al lia kulturo, kaj multe pri enriĉiginta ol resti en la angla montopinto, atendante, ke popolaĉo suprenvenas ĝis nia alto. Lerni Esperanton estas nur duonpaŝi, vere, sed ĝi ankaŭ estas invito al tiuj anoj de aliaj kulturoj por imiti nin kaj trovi nin ĉe tiu vojkruco, kiu nia lingvo de konkordo kaj kuneco estas.

28. Esperanto estas nur miksaĵo de lingvoj, aŭ de vortoj el diversaj lingvoj.

Kiu lingvo ne estas miksaĵo? Tiu lingvo parolita de iberoj kaj keltoj estis forbalaita de la latina, lingvo imperia, antaŭ pli ol du mil jaroj. Popola latina parolita tiam estas tio, kion ni povas konsideri origino de la nuna hispana (aŭ la franca, itala, kaj tiel plu). Sed ĝi miksiĝis kun tiu lingvo de gotoj, kaj poste kun la araba, kiu anstataŭigis ĝin preskaŭ totale dum ok cent jaroj. Kiam kristanaj reĝoj sukcesis forpeli muslimojn el Hispanio, nia lingvo konservis sennombrajn vortojn el la araba, kelkaj el ili tre ofte uzataj, kiel *alcantarilla*, *Andaluzio* kaj tiel plu. Moderne ni ne devas pensi tro longe por trovi francajn, anglajn kaj germanajn vortojn en la hispana.

La angla ne fartas pli bone rilate al miksaĵo lingva: malnova anglosaksona miksiĝis kun grandaj kvantoj el vortoj nordaj kaj francaj je la XI-a jarcento, post

invado de normandoj, kiuj ankaŭ forprenis el malnova angla lingvo sian riĉan sistemo pri verba kaj noma fleksiaro. Kion oni povas diri pri lingvo saksona kies vortaro konsistas je sia 75% el latinaj vortoj? Ĉu ĝi estas miksaĵo, aŭ ne?

Se je ambaŭ kazoj, hispana kaj angla, la miksaĵo fariĝis laŭ kapricaj kriterioj, se tute ne laŭ perforto, Esperanto ekhavis siajn vortojn post kompariva studo zorgita farite inter diversaj lingvoj, tiel ke elektitaj vortoj estas plej eble kiel komunaj al plimulto el ili. Ĝi ne estas kaprica afero, sed komunsenca. Tial *mesa* oni diras **tablo** (itala *table*, franca *table*, angla *table*). Sed se hispanaj vortoj *alfanje*, *Almería* kaj *Guadalquivir* estas substantivoj, en Esperanto ĉiu substantivo finas per -o: **kurvoglavo**, **Almerio**, **Gvadalkiviro**, kio donas regulecon kaj komprenecon tre pligranda al tiu de la angla aŭ hispana, eĉ por denaskaj parolantoj. En la angla kazo, neniu diras al ni ĉu *report* estas substantivo aŭ verbo, se ni ne vidas la vorton uzitan ene de frazo. En la hispana, *mesa* povas esti **tablo**, sed ankaŭ **eltiru** (vian harojn). Ni vidas, sekve, ke vortoj esperantaj ne estas hazarda miksaĵo, sed serio da eroj alte strukturitaj kaj logikaj kies celo estas atingi komprenebleco efika cento pro cento.


29. Vi diras, ke Esperanto ne havas dialektojn, sed mi vidis kiel franco, anglo kaj hispano parolis ĝin, kaj iliaj paroloj malsimilis.

Ne estas same paroli dialekton kaj fuŝparoli fremdan lingvon. Kiam oni lernas lingvon nesian, oni klopodas imiti fonemojn de la fremda lingvo, tiel ke

kiam oni sukcesas, denaskaj parolantoj diras, ke li ne ŝajnas fremdulo, kio fierigas onin. En Esperanto ne estas denaska popolo, ĉar **Esperantio** tute ne ekzistas, malgraŭ tio, kion oni aŭdas tie ajn.

Kiam oni parolas la anglan kun akcento —ni diru— de Granada, oni ne kuraĝas diri, ke ekzistas *dialekto granada* de la angla, sed simple ke tiu homo klopodas paroli la anglan, ne tute sukcese. Se tiu sama persono parolus Esperanton per tiu sama malgranda zorgo, kiel oni povas diri, ke li *parolas Esperanton kun granada akcento*?

Malfeliĉe, malmankas esperantistoj kiuj ne zorgas pri lerni fonemojn de Esperanto, kiuj ne koincidas tute kun tiuj de iu ajn lingvo, feliĉe. Kaj mi diras *feliĉe*, ĉar tio devigas onin malfermi sian menson al aliuloj. Esperanto apartenas al ni ĉiuj, vere, sed ankaŭ ĝi apartenas *al la aliuloj*, kaj pro tio *oni ne povas paroli ĝin tiel, kiel oni volas*. Vi diras, ke vi aŭdis francon, anglon kaj hispanon paroli ĝin per sia vilaĝa akcento. Tio estas honto, kiu kostas ne plu ol paro da horoj ripari. Sed tio estas afero por ripari ĉiu persono per li aŭ ŝi mem.



30 Maleblas, ke la angla ĉesos esti internacia lingvo..!

Iam tri kvaronoj ol homaro parolis la latinan. Hodiaŭ neniu parolas ĝin, eĉ en lernejoj. Ĉu oni povas eltiri konkludon el tio?

Dairigota de Olga López

SOCIO, SOCIALA, SOCIETO



Jen tri radikvortoj en Esperanto, kiuj havas propran signifon iom malsimila al la hispana lingvo. *Socio* tradukiĝas en la hispana per “sociedad”, kaj tiu “sociedad” povas esti, laŭ la vortaro de la Akademio, kunveno pli malpli granda da personoj, familioj aŭ nacioj kaj tiel same komerca, geedza, kooperativa aŭ anonima societoj. *Socio* en Esperanto, laŭ PIV, en la unua signifo estas simila al la hispana: “Tuto da homoj, kunvivantaj pro komunaj interesoj kaj havante komunajn kutimojn kaj komunajn leĝojn. En la adjektiva formo *socia*: 1. koncernanta la socion: la socia vivo, la sociaj sciencoj, la nuntempa socia stato, la granda pesto, kun ĉiu alia socia malfeliĉo. Tiuj esprimoj jam ne estas rekte tradukeblaj al Esperanto. En la hispana, rilate al la “sociedad” estas “social” kiu en Esperanto havas la du signifojn *socian* kaj *socialan*.

Pri la “sociedad” rilate al komerco kaj asocioj, en Esperanto estas “societo”, ne kiel diminutivo de “socio”, sed kiel propra substantiva radikoj.

En la hispana lingvo “socialismo” devenas de “social”. En Esperanto “socialismo” devenas de la adjektiva radikoj “sociala”, ne de la substantivo “socio”.

Tiu diferenco en la signifo de la radikoj inter la hispana kaj Esperanto okazigas dubojn, precipe pri la signifo de *socia* kaj *sociala*. Jen ekzemplo

eltirita el *La Bona Lingvo* de Claude Piron: *Kial eblas diri pri Esperanto, ke ĝi estas psikologie, “socie”, morale, arte, strukture bona lingvo?”*. Ĉu en tiu senco “socie” povas esti anstataŭata per “sociala”? Ne! La lingva problemo estas socia, sendependa de la disdivido de la socio en diversaj sociaj klasoj. La sendungeco aŭ senlaboreco estas sociala afero, kiel tiel same ĉiuj konfliktoj inter la kapitalo kaj la laboristoj.

Al la esperantista movado povas aparteni homoj el ĉiuj sociaj klasoj, ĉar la lingva problemo estas socia kaj komuna al la tuta homaro. En la esperantista movado de antaŭ ol la unua mondmilito estis multaj intelektuloj, riĉuloj kaj eĉ la generalo Severt, subdirektoro de granda ŝipkonstrua entrepreno. En Hispanio multaj el la unuaj esperantistoj estis militistoj kaj ekleziuloj. Ili deziris solvi la socian problemon de la internacia komunikado. La fondiĝo de SAT en Prago en la jaro 1921 sub la devizo “For La Neŭtralismon!”, estiĝis pro tio, ke krom la socia lingva problemoj, ili ankaŭ deziris batali por la solvo de la *sociala* problemoj de la laboristaro.

La nuntempaj sociaj problemoj estas multegaj en mondo, kiu ekonomie planediĝas, sed naskiĝas novaj etnaj aŭ gentaj naciismoj, kaj se ne estas grandaj militoj oftas la terorismo. La libera merkato pro la konkurenco povas provoki gravajn sociajn krizojn, kiel la ruiniĝojn de entreprenoj, metiistoj kaj agrokulturistoj en multaj geografiaj zonoj kaj provoki haoson kaj diktaturojn. Granda sociala krizo sekvas la ruiniĝon de entreprenoj.

La sociala problemo estas unu el la sociaj problemoj ligita al la socia problemo entute. Ne solviĝos la sociala problemo, se antaŭe ne solviĝas la sociaj problemoj de la milito, kaj de la disdivido de la mondo en tute soberenaj ŝtatoj. La naciaj patriotismoj devas esti anstataŭitaj per la Tera patriotismo, kio ebligos la unuecon de la homaro.

La lingvo Esperanto povas esti, ne nur kiel lingvo, sed alportante la mesaĝon de la unuiĝo de la homaro ĝis tutmonda federacio de popoloj, la plej grava rimedo por solvi la socian problemon de la krizo de nia civilizacio por eniri survoje al universala civilizacio, en kiu ankaŭ devas esti solvita la sociala klasproblemo.

Ni ne pretendu solvi ĉiujn sociajn problemojn por ĉiu, ĉiam kaj ĉie. La kunvivado ĉiam estos problemara, sed oni devas eviti la grandajn krizojn, kiuj povos ruinigi la homaron kiel atomnuklea milito aŭ la perforta unuiĝo de la homaro sub unu sola granda imperio. Necesas ĝenerala scio kaj bonvolo, necesas vasta interrilatiĝo kapabla por akordigi planedan socion en planediĝo konkorda kun la ekonomia planediĝo. Necesas ŝanĝo de la pensmaniero je planeda skalo. Esperanto kun ĝia interna ideo aŭ homaranismo povas roli kiel la precipa kohero de la tutmonda socio.

La esperantistoj devas esti la unuaj, kiuj devas kompreni la socian gravecon de la esperantismo.

*Giordano Moya
(majo 1998)*

Venas el paĝo 16-a

Komitato de la 58-a Kongreso Hispana de Esperanto, la flagon de la Hispana Federacio Esperanto.

Kamarado Luis Serrano invitis nin ankaŭ al la

Flago
transdonata



Sesa Semajno de Ekonomio en Calafell. Ĝi estas iternacia renkonto de esperantistoj. Li diris, ke ili *ofertas semajnon de eventoj en kiuj oni devas nepre paroli en Espe-*

ranto. Estas prelegoj kaj debatoj, ekskursoj, post vespermanĝo estas debato pri aliaj afe-

roj. Tio okazos en

oktobro. Tiamaniere profitas hotelon malpli multekostan (duono de simpla ĉambro en Valjadolido). Ni celas praktiki kaj plibonigi la lingvon Esperanton.

Tiam Prezidanto Sanĉo fermis la kongreson 57-an de la Hispana Esperanto Federacio.

La lasta akto, tamen, okazis poste. **Miguel Fernández** devis

prelegi **hispane** pri **Federico García**

Lorca, sed pro

politikaj kaŭzoj

oni rifuzis al ni

ejon antaŭ la ĝe-

nerala publiko, kaj tial

li faris tion por ni. Aparte kortuŝa estis sia interpretado de *Je la kvina posttagmeze* (a las cinco de la tarde).



Jesuo

Valjadolido, mia amo!

Jes, mi kunestis la Kongreson de Valjadolido. Sufiĉe konata urbo de nia lando, Ni perdis la prezentadon de la Kongreso, ĉar ni devis veturi el la alia parto de Hispanio. Finfine ni atingis la urbon, luis ĉambron je la urbocentro, kie ni povis



vidi tiun belan fonton kiun ni montras en la foto, kaj kiu tre taŭgas kiel simbolo de esperanta kongreso, kaj piediris al la kongresejo, en la Centro Cívico El Campillo (cívita centro kampeto).

Neologismoj kaj malneologismoj.-

La venintan tagon, la trian de majo, ni aŭskultis interesan prelegon de akademiano Georgo Kamaĉo pri **Neologismoj kaj malneologismoj**, je la deka horo. Li diris, ke kutime esperantistoj malŝatas neologismojn, eble sen scii kio ili estas. Li referis al libro de Claude Piron, **La bona lingvo** (1989), kie oni legas pri lingvoj *bona* kaj *malbona*. Kamaĉo diris, ke la *bona lingvo* estas *pirona lingvo* laŭ Piron. Tamen, necesas, ke oni scias, kio estas

neologismo: *neologismo povas esti vorto, kiu ne ankoraŭ estis uzata. Laŭ Zamenhof, ĝi estis anstataŭo de ekzistanta vorto. Ekzemple: **kanono** anstataŭ **pafilego**. Multe da homoj diras, ke nova vorto estas neologismo nur se ili malŝatas ĝin. Sed Zamenhof mem estis la plej granda kreinto de neologismoj en Esperanto.*

Li ankaŭ citis la **Parnasan Gvidlibron** verkita de Gaston Warengnien en 1932, kie la aŭtoro citas tiujn neologismojn de Zamenhof: akuzi, fardo, brego, hordo, koĉero, ŝablono, kaj tiel plu. En tiu libro estas ankaŭ *poezia fakvortaro* kun 600 vortoj: kelkaj el ili estas normalaj vortoj, aliaj estas kaj familiaraj kaj poeziaj: *ambiguaj, amapolo, damni, dekalogo, eseo, etoso, galaksio, incesto...*, estas ankaŭ neologismoj. Multaj estas vulgaraj: *piĉo, fiki, kaĉo, ktp*. Aliaj poeziaj vortoj estas: *bebo, evento, frida, mesaĝo, prizono, pigra, strangoli...* *Mi ne povas citi ĉiujn —li diris—, sed estas evoluo, kaj la nuna Esperanto ne estas ebla sen tiuj neologismoj. Kiam mi diras nuna Esperanto mi ne volas diri poezia, sed komuna Esperanto. Beletraj vortoj estas fatamorgano, filandro, ladrono (stelisto), ktp. Aliaj vortoj ŝanĝis sian formon: dorika (ne dora), koktelo (anstataŭ koktejlo). Tiuj vortoj ne aperis en PIV.*

Nia samideano Kamaĉo pensigis nin pri tiuj familiaraj vortoj, kiujn ni uzas: *nupto, olda, ruro* (kvankam ne ofte),

sordida. Multaj tiuj vortoj ege utilas por artikola leganto. Tiuj vortoj ne estis



Kio estas neologismo?

rigardataj kiel neologismoj. Kaj tio portas nin al *malneologismoj*.

Malneologismoj —laŭ Kamaĉo— estas vortoj, kiujn jam de jardekoj oni uzas multe, kvankam ili aperis kiel neologismoj. Normale venas vortoj el poezio; ankaŭ pro beletra prozo. De tie ili transiras al la komuna lingvo.

Tiam Kamaĉo citis kelkajn tekstojn el tiuj libroj: **Tien**, de Johan Valano, kies stilon la preleganto ne ŝatas, kvankam la temo estas ŝoka kaj impona. Ankaŭ li citis **La amon de Paluzio**, de Manuel Seabra: *ĝi temas pri la sama ideo de Cent jaroj de soleco* (de Gabriel Garcia Márquez), *sed en Barselono. La libro havas glosaro pri neologismoj. Estas ĝi senzorga lingvo, kun eĉ eraroj. Estas bedaŭrinde; tio ekzemplas la veran MALBONAN LINGVON, LA FUŜULAN LINGVON*. Okaze de tio, la preleganto diris, ke li aŭdis en prelego *mediumo* anstataŭ *medio*. Li proponas *lingvon por altkvalita komunikado*. Ni uzu *regulojn*. Ne nur por verki, sed ankaŭ por paroli.

Alia libro citita de li estis **Apenaŭ papilio**, de Tibor Sekelj: *li verkas tre bone, kaj li estis tre bona reprezentanto de tiu bona lingvo de Piron*. Alia libro: **La Manto**, de Paŭla Merti: *aŭtografa romano. Ĝi estas skandala libro. Ankaŭ estas ĉi tie aro da poeziaj vortoj: genitalo, smajlo (sensona lipa rideto), inkubo (koŝmaro)*. *La stilo estas flua, ĝi estas bona legaĵo*.

Alia libro estas **Hetajro dormas**, de Éli Urbánová: *stilo ankaŭ flua, ankaŭ interesa legaĵo; kaj kvankam aperas multaj neologismoj, ĝi estas ege rekomendinda*.

Ekstretoj, de Miguel Fernández, Liven Dek, G. Neves kaj la preleganto: *ni uzas vortojn kiuj estas en glosaro, kaj ni esperas, ke ili iĝos kutimaj vortoj*.

Libro de Neĵie, de Geraldo Matos: *kelkaj novaĵoj estas plezuraj kunmetaĵoj, kiel gekornuoj. Li proponas vortojn el itala kaj kreitaj, kiel ŝoŝo por vulvo*.

Ne pensu, ke mi volas Esperanton, kiu enhavas plenan vortaron. Ni ne estas popolo, kaj ni havas nur komunan lingvon. Estas grave, ke ĝi permesas altkvalitan komunikadon. Oni povas uzi fuŝan anglan por komunikado. Sed ni uzu Esperanton por altkvalita komunikado. Mi diras, ke ne sufiĉas nur diri: 'mi ne ŝatas neologismojn', aŭ 'mi ŝatas ilin'. Ni legu kun malfermita menso. Se ni legas poemon de ĉina poeto, ni devas serĉi vortojn en vortaro.

Georgo Kamaĉo tiam legis poemon de Geraldo Matos, kaj poste li demandis sin: **Ĉu neologismoj ne estas ĉefe eŭropismoj?** *Esperanto ne estas statistike lingvo, en tiu senso, ke lingvo estas dialekto kun armeo. La baza vortaro venas el diversaj lingvoj. Sed ĝi estas pleje eltirita el latinaj kaj germanaj lingvoj. Ankaŭ el slavaj. Aliaj lingvoj influis poste. Tibor Sekelj uzas vortojn kiel ĉombo (sako portata sur onia dorso). Mi kredas, ke entute estas novaj vortoj el Afriko, Oceanio kaj Azio.*

Kio signifas la kontribuon de Ibera Libere en Esperanton? *Ni volas fari poezion modernan. Ni ne devigas uzon. Ni estas Ibera Skolo. Ni volas paroli pri modernaj aferoj per precizaj vortoj. Tion ni celas.*

Ĉu jare Akademio de Esperanto akceptas neologismojn, kiuj iĝas oficialaj? *Akademio ne okupiĝas pri tio. Ĉiu akademiano havas sian opinion pri tio, sed ne estas komuna opinio. Akademio oficialigis vortojn nur tre malofte. Tiun rolon havas la vortaroj.*

Homo, homaro, kreanta naturo.-

S-ro Jesús Raposo parolis pri *La tri fundamentoj: homo, homaro kaj kreanta naturo*. Li diris, ke *ordo ne povas esti ĝi el hazardo. La universo estas fundamenta por ĉiuj estaĵoj. La plej evidentaj perfektejoj estas spaco kaj tempo. Ties interrilato estas ordo. Universo enhavas neperfektecon, kiu estas ne fundamenta*

ĉar en si mem laŭ difino estas perfekteco. La spirito de bono kaj de vero, vero kaj bono estas unuo: dieco.

Li ankaŭ diris, ke *respekto estas universala devorajto. Kiam mankas respekto, libereco degeneras, kaj paco estas moko. Tial devas esti universala afano de edukado kaj ne nur por infanoj. Ni ĉiuj devas lerni la praktikadon de tiu universala respekto. Oni ne konfuzu*



respekto kun diferencaj meritoj apartaj de personoj. Merito kaj kulpo estas ekster

la temo de ĉi tiu prelego. Sed kiel respekti la alian se oni ne konas la lingvojn de aliaj personoj? Ĉiu en la universo estas ligita al ĉio. Interlingvo, pulso de l'universo, religieco kosma, solidareco, alivorte: kora.

Kunveno de HEF.-

Salutis la prezidanto Sancho nome sia kaj de vicprezidanto Galofré, kiu ne povis ĉeesti kun ni.

Sekretario Manuel Parra Benito legis la akton (protokolon, ili nomas ĝin) de la antaŭa kunveno. Oni aprobis ĝin. La kontojn kaj bilancon oni ankaŭ aprobis, kaj oni devis resume legi, ĉar ne ĉiuj ricevis la **Boletín**, kiu enhavis tiun raporton.

Poste oni diskutis, ke ekzistas nova leĝo (fakte dujaraĝa jam), kiu modifis statutojn de Federacio. Tiurilate, ni ne povis ne ratifi tiujn ŝanĝojn.

Oni decidis, ke la venontan jaron la Kongreso (58-a) de HEF okazos en Kasteljono dum la tria semajno de julio. Ĝi okazos en la universitato de Kasteljono ĉar ĝi ofertas kongresejo kaj restadejo.

En *petoj kaj demandoj*, oni raportis pri la vortaro de Fernando de Diego. Poste, Antonio Valen plilarĝigis la informon. Manuel Pancorbo okupiĝas pri la traduko al Interreto. Darío Rodríguez ankaŭ parolis pri novaĵgrupoj kaj dissendolistoj por kunigi esperantistojn. Antonio Valen diris, ke *ni esperas, ke ni povos eldoni la vortaron dum la venonta jaro. Ses dek homoj laboras pri ĝi, kaj ni havas jam 50 000 kapvortojn*. Oni ankoraŭ ne scias pri la prezo. Eble subvencio helpos. Eventuale, la vortaro ne aperos ĝis la jaro 2 000.

Muzika vespero.-

Dum samideano Aŭgusto Casquero



prelegis hispane en salono de CajaValladolid, **Solo** muzikis en salono *Borja*, kaj poste ni vidis dancadon pri ĥotojn kastilajn. Ĥotoj kastilajn masimilas al tiuj de aliaj partoj de Hispanio, kiel Aragono aŭ Mursjo, pri tio, ke la ritmo estas pli malrapida, kaj la muzikiloj malpli nombraj. La spektaklo estis ĉarma kaj memorinda.

Fino.-

Dimanĉon, ni kunvenis por fermi la kongreso kaj Prezidanto Sanĉo dankis nian grandan ĉeeston (103 kongresanoj, rekorda cifero), kaj dankis la sukceson de la kongreso al Loka Komitato, al kiu ni aplaŭdegis.

Post tio oni donis la premion *Klara Zilbernik* al **Carmen Álvarez**, patrino de Rafaela Urueña, kiu alprenis ĝin nome de ŝi, ĉar ŝi deĵoras ĉe malsana bofratino. Carmen Álvarez estas la 23-a premiito de *Klara Zilbernik*, premio per kiu la Hispana Eperanto Federacio distingas edzinon apogantan al esperantista edzo, same kiel la vera Klara apogis sian edzon, Ludoviko Zamenhof.

Francisco Conejero (pron. koneĥero) manifestis, ke li *havas nun gravan defion en Kasteljono 99. Nia celo estas eniĝi en la universitato, same kiel oni faris en Valensjo. Ni laboris dum kvar jaroj por havi placon de Esperanto. Ni sekve volis organizi Nacian Kongreson kaj ofertas al vi ĉiuj laboron kaj invitas vin al Kasteljono*. Tiam oni transdonis al S-ro Conejero, prezidanto de la Loka

Muziko

Heitor Villa-Lobos: perspektivo al lia gitarmuziko

de Orlando Fraga

1. Frua vivo.

kulturo kaj nekutima inte-

ligento, estis praktika muzikanto kun perfekta kompetento. Kun li mi iris ĉiam al provprezentoj, koncertoj kaj ope-

Considere minhas obras, como cartas que escrevi à Portêla de seu esposo respectivo.

H. Villa-Lobos

“Mi konsideras miajn verkojn kiel leterojn, kiujn mi skribis al posteularo sen atendi respondojn”.

H. Villa-Lobos.

“Ekde mia knabeco oni enkondukis min al muzika vivo per la manoj de mia patro, kiu donis al mi etan violonĉelon. Mia patro, krom esti viro kun

roj por al kutimiĝi al instrumenta ensemblo. Mi ankaŭ lernis ludi la klarneton kaj oni petis min decidi pri la formo, stilo, karakterizo kaj origino de tiu muziko, kiun mi aŭdas, kaj ankaŭ mi devis diri rapide la nomon de la noto de tiuj sonoj aŭ bruoj, kiuj aperis okaze iumomente, ekzemple kiel ĉirpo de radoj de kamiono, kanto de birdo, metalaĵo falanta, kaj tiel plu. Kompatinda mi, se mi eraris!”

Komencon de ĉi jarcento, Rio de Janeiro estis tre diferenca de tiu metropolo hodiaŭa. La brazila ĉefurbo tiam karakteriziĝis per forta eŭropa influo. Eĉ pri ĉiutaga vivo, ĝin plenigis muziko. Stratoj kaj trinkejoj, kaj ĉie homoj povus esti invaditaj de

¹Persono, kiu ludas ŝoron (vidu ³)



CHORÕES¹ kiuj plenigis vesperojn per iliaj serenadoj. Aroj da junuloj formis blovorkestretojn, kiuj ludis ĉe festoj, dancejoj, geedziĝoj, karnavalo kaj ĉiaj solenaĵoj, ludante surstrate post fermo de kunvenejoj, kelkfoje iradante tra malplenaj stratoj havante nur mallongajn interrompojn ĉe proksimaj trinkejoj por stimuldonantaj trinkoj. Diversaj grupoj kunvenis en serpenteskaj stratoj kaj ili defiis unu la aliajn je muzikaj konkursoj, kiuj ofte finis batale. Muzikistoj facile promenis mejlojn dum la nokto, kantante kaj ludante nur por plezuro.

Heitor Villa-lobos naskiĝis tie la 5-an de marto de 1887². Lia trejnado estis memdonita, ne akademia. Li ricevis siajn unuajn lecionojn el sia patro, Raúl, kiu laboris ĉe la Nacia Libro, en Rio de Janeiro, kaj estis bona muzikanto amatora. Raúl Villa-Lobos instruis sian filon ekde tre juna aĝo ludi violonĉelon, uzante aldiviolonon unue tiucele. Violonĉelo restis lia instrumento dumviva por Heitor, tiu instrumento, kiun li studis tre serioze, aldone al gitaro, kiun li lernis per si mem en la stratoj de Rio kaj poste li disvolvis sian klerigon pri ĝi ĝis supera nivelo studante la plej gravajn komponistojn disponeblajn ĉe gitara literaturo je la komenco de la jarcento. La amo de Villa-Lobos por ambaŭ instrumentoj igis lin verki multajn pecojn kun surprizantaj instrumentaroj. Kiam lia patro mortis en 1899, la patrino devis eduki lin kaj liajn gefratojn ŝi mem. Sed Villa-Lobos estis nepersistema knabo, kaj li preferis kunhavi bohemian vivon ĉe popolaj ²Biografistoj ne tute konsentas pri tio. Lia franca identigilo portas jaron 1891; lia balotilo diras, ke 1883; sed ĵusaj esploroj konkludas, ke 1887 pli veras.

muzikistoj ol ĉeesti kuracistajn studojn antaŭpensitajn por li. Kun tiuj popolaj muzikistoj li sukcesis praktiki arton pri improvizi akompanadon gitaran por melodioj kapricaj de CHORO³. Dum li ĉeestis gitarajn lecionojn de najbaro, li devis kaŝi ĝin al patrino, kvankam ne pro tio li ne komponis por ĝi. La unua verko por gitaro estis *Mazurko en Re* (1899) kaj *Panqueca* (1900). Lia patro lasis multvaloran libraron, kaj Villa-Lobos malkovris, ke li povis vendi kelkajn belajn librojn al librovendejoj po granda kvanto. Post tio liaj bonaj rilatoj kun kantistoj kaj ludistoj popolaj pliboniĝis pro trinkaĵoj financiitaj je taŭgaj momentoj de la ankoraŭestonta komponisto.

Dum Villa-Lobos kreskis, li restis membro de grupo gvidata de Quincas Laranjeiras⁴, kiu tradicie organizis kunvenojn je Strato Carioca. Juna Villa-Lobos ludis gitaron kaj influoj el tiuj tempoj aperas ĉe lia Unua Bacchiana Brasileira (brazila Bach-a komponaĵo), kies fugon li komponis laŭ la stilo de Satiro Bilhar, alia popola ludanto. Baldaŭ sekvis nova aro da gitarpecoj: *Valsa Brilhante* (brila valso, 1904), *Fantasia* (Fantazio, 1909), *Tarantela* (Danco de araneo, 1910), *Simples*⁵ (simploj, 1911), kaj *Oito Dobrados*⁶ (ok duoblitaj, 1909/12). Tamen, lia unua grava verko tiam

³Instrumenta ĝenro de muziko tre popola en Rio de Janeiro de la komenco de la XX-a jarcento.

⁴Emerito muzikisto tiam.

⁵Muziko verkita kiel lecionon por siaj gitarlernantoj. Tiun ĉi valson daŭrige ludis Miguel Llobet (pro. migel' ĝobet' (1878-1938), fama hispana gitaristo de la unua jarcentuono

⁶Ili estas: Paraguaio, Brasil, Chorão, Saúde, Paranaçu, Cabeçudo, Rio de Janeiro kaj Padre Pedro.

estas la *Suite Popular Brasileira* (Sŭito popola brazila, 1908/12)⁷, kiun publikigis poste Max & Eschig en Parizo.

2. Konante Brazilon.

Malgraŭ sia preskaŭ malriĉa maniero vivi, Villa-Lobos klopodis fini sian akademian edukadon en Lernejo São Bento, sed post kelkaj monatoj, li rezignis. Inter la 18-a kaj 28-a jaraĝo li vojaĝis tra Brazilo. Por havi monon li vendis la ceteran libron de sia patro por financi sian unuan vojaĝon al Nordoriento de Brazilo kaj li studis la muzikon de popolaj kantistoj surloke, ilian stilon de interpretado kaj iliajn instrumentojn. Per meminventita stenografio li registris melodiojn, *defiojn*⁸ kaj *aŭtojn*⁹, kaj ankaŭ tragikajn dancojn kaj eventuale kolektis pli ol mil muzikajn temojn kaj ritmojn. Tiu ega materialo estis la ĉefa fonto por liaj unuaj verkoj post kiam li reiris al Rio. Tamen, li baldaŭ komencis novan vojaĝon, nun al Suda Regiono, kie li laboris en faktorio de alumetoj en Paranaguá, Paraná, por gajni monon. Rilate al muziko, lia ĉeesto estis malkuraĝiga. Tiu zono de la lando estas tre infiltrita de eŭropaj migrantoj kaj tiel proksima al limo kun Argentino



kaj Uruguay, tiel ke tiu popola muziko, kiun li povis kolekti, estis malmulte originala.

Denove en Rio de Janeiro en 1907, Villa-Lobos provis sensukcese submeti sin al disciplino de teĥnika instruado pri komponado. Tial li enskribis sin je Nacia Instituto pri Muziko kaj ĉeestis harmoniajn lecionojn kun Angelo França kaj pri komponado kun Frederico Nascimento, ambaŭ sufiĉe konitaj instruistoj tiam. Lia orgojla temperamento kaj abundega imagopovo, kune kun tiu kreiva eksperto, kiun li jam havis, devigis lin forlasi la klasojn post mallonga tempo, kvankam li prenis admiron el siaj instruistoj, aparte de Francisco Braga (1868/1945), kiu daŭre helpis kaj konsilis lin tra tiuj fruaj jaroj de lia kariero. Li studis la metodon pri komponado de d'Indy kun granda intereso, kaj tio donis al li gvidon por kreivo lia. Aldone, li legis avido partiturojn de

⁷*Villa-Lobos diris iam, ke na nomon SŪITON kaj sufikson ŜORON aldonis la eldonisto Max Eschig kontraŭ lia volo, sed poste lia vidvino, Armanda Villa-Lobos, klarigis, ke la komponisto mem faris tion laŭ sugesto de la eldonisto.*

⁸*Defio poezia, per kiu defianto demandas poezie, kaj la defito devas respondi per sama poeziformo. Popola je Nordbrazilo (D. Appleby, **The Music of Brasil**).*

⁹*Hispanaj aŭ portugalaĵ teatraĵoj religiaj populaj; tre sukcesaj dum koloniismaj tempoj, kutime ili inkluzivis cirkonstancan muzikon.*

grandaj majstroj, de Bach al Chopin, kaj ankaŭ de grandaj majstroj pri gitaro, kiel Fernando Sor (1778/1839), Ferdinando Carulli (1779/1841), Mateo Carcassi (1792/1841) kaj Mauro Giuliani (1781/1829).

La sekvantan vojaĝon Villa-Lobos iris al Centra Regiono, kaj post tiam li iris al Nordo denove. En Ŝtato Bahía li aŭskultis Debussy-n unuafoje. Lia muziko ne impresis lin tre multe, kaj li bezonis, ke Arturo Rubinstein, kiun Villa-Lobos konis kelkajn monatojn poste -kiam li revenis al Rio de Janeiro-malkovru al li ĉiujn sekretojn pri tiu nova muziko. Verŝajne Villa-Lobos neniam antaŭe studis novajn verkojn de Schoenberg kaj Stravinsky, kaj tial liajn ĝistiamajn eksperimentojn oni povas konsideri spontaneaj kaj naturaj.

Koncerto je Ĉambro de Ĵurnalo de Komerco (Jornal do Comercio Hall) la 13-an de novembro de 1915 prezentis kelkajn komponaĵojn liajn: la **Pianan Triopon 1-an, Sonaton 2-an** por violono kaj piano, la **Valson Ŝercan** por piano sola, **Lulkanton** por violonĉelo kaj piano, kaj kelkajn kantojn oni ludis ricevante disputitajn opiniojn. Postaj programoj sekvis je regulaj intertempoj, kiuj portis la komponiston al publika atento. En 1917 li verkis sian **Sesopon Mistikan (Sexteto Místico)**¹⁰, kiu reprezentas lian serĉadon pri nova lingvo. Villa-Lobos ankoraŭ gajnis sian vivon ludante violonĉelon, sed li komponis pli kaj pli. Lia **Ŝôro 1-a (Choro 1-a)**, verkita en 1920, signifas la

¹⁰Por gitaro, fluto, klarneto, saksofono, harpo kaj violonĉelo. Ĝi premieriĝis en 1963 kun Turibio Santos je la gitaro.

komencon de sia matureco rilate al gitara muziko. Ankaŭ lia populareco kreskis multe post la **Semajno pri arto moderna**¹¹, kvankam ĝi estis la plej pridisputita arta evento dum la unua duonjarcento brazila.

3. Parizo.

Liaj talentoj agnoskitaj, Villa-Lobos ricevis financan apogon el Federacia Registaro kaj aro da riĉuloj, kio permesis lin vojaĝi al Eŭropo. De 1923 ĝis 1930 li vivis en Parizo, sed li ankaŭ vojaĝis intertempe en Brazilon, Bonaeron kaj ĉefajn eŭropajn ĉefurbojn. Baldaŭ oni akceptis lin ĉe la plej interna franca rondeto muzika. Tie lia sukceso estis ega: koncertoj pri liaj muziko, kiujn oni ludis en 1924 kaj 1927, furoris. Inter tiuj homoj al kiuj li ege rilatis estis Edgard Varèse, Florent Schmitt, Pablo Picasso, Fernand Léger, Serge Prokofieff kaj Leopold Stokowski. En 1924 li iĝis profesoro pri komponado je la Internacia Konservatorio de Muziko de Parizo, kie li konis Vincent d'Indy, el kiu Villa-Lobos ricevis utilajn konsilojn pri komponado. Li ankaŭ konis Andreon Segovian (1893/1986), tiu fama kaj influa hispana gitaristo, kiu baldaŭ iĝis unu el la plej gravaj interpretistoj de la muziko de Villa-Lobos. Por Segovia, Villa-Lobos verkis serion de **Dekdu studojn** (1929), la **Enkondukon en Ŝoron (Introdução ao Chôro)** por orkestro kaj gitaro, kiu aperis tiun saman jaron, kaj ĝi estas la unua el dek-kvar, kiuj uzas varian instrumentaron.

¹¹Ankaŭ nomitas **Semajno de la 22-a**, ĝi okazis je 1922 en São Paulo, kunvenigante muzikistojn, pentristojn, geaktorajn, poetojn, prelegojn kaj tiel plu. Ĝi plendis pri nova kutura ordo, naciismo.

4. Denove en Brazilo.

En 1930 Villa-Lobos reiris en Brazilon, kie li iĝis, kune kun arĥitektoj, pentristoj kaj aliaj intelektuloj, unu el la plej estimataj artistoj de la nova forte nacia reĝimo kreita de la revolucio gvidata de Getulio Vargas¹². Unue li vivis en São Paulo, sed ĝi baldaŭ iĝis centro de politika malstabileco. Nova militista registaro venis, kiu influis negative al kultura scenejo. Villa-Lobos seniluziiĝis kaj pretiĝis reiri al Eŭropo kiam neatendite, kunvokis lin nova registaro de São Paulo. Oni baldaŭ atingis



interkonsenton kaj Villa-Lobos eniĝis entuziasme en sia plano pri muzika edukado. Li vojaĝis tra interno de la ŝtato de São Paulo dum du jaroj enkondukante kaj supervidante sian projekton.

En 1932 li reiris en Rio de Janeiro kaj fondis la SEMA-n (Inspektaro por Muzika kaj Arta Edukado). Li aktiviĝis pri multaj kampoj pri edukado kaj eĉ fondis orkestron portante sian nomon. Tiuj edukaj aktivajoj de SEMA daŭrige agis ĝis la kreado de Nacia Konservatorio por Orfea Kanto la 26-an de novembro de 1942 sub lia respondeco. Li montris grandan entuziasmon pri tiuj aktivajoj, disvolvante bravan kvankam koheran

¹²Brazila diktatoro dum 1930-45 kaj 1951-4.

programon pri komenca instruado je unuagrada kaj mezgrada instruado, alta trejnado, koncerta organizado kaj konservo da populaj tradicioj. Dume, kelkajn gitarajn verkojn li kreis: **Disdono de floroj** (*Distribuição da Flores*, 1937), la **Aria das Bachianas Brasileiras 5-a** (ario de *Bahanoj brazilaj*, 1938) kaj **Ses preludoj** (*Ses preludios*, 1940).

Dum tiu periodo Villa-Lobos eliris Brazilon nur por mallongaj vojaĝoj por orkestrodirekti en Argentino, Urugvajo kaj Ĉilio kaj partopreni la Internacian Kongreson pri Muzika Edukado ĉe Prago (1936), kaj okaze vizitante Vienon. En 1944 li vojaĝis al Usono, kie li reiris ofte kaj kie li atingis solidan famon. Dum tiu unua vizito li direktis la Jensen Sinfonia Orchestra de Los Angeles en programo da verkoj siaj, kaj en 1945 li koncertis en Bostono, Novjorko kaj Ĉikago. Je la fino de la Dua Mondmilito al li eblis reiri al Parizo, kie li estis elektita koresponda ano de la Instituto de Francio, anstataŭante mortintan hispanon Manuel de Falla.

Post sia reveno Villa-Lobos fondis en Rio de Janeiro la Brazilan Akademion de Muziko, kies prezidanto li estis ĝis sia morto. Kiam lia sano plimalboniĝis, li iris al Novjorko dum kelkaj monatoj por terapio je Memorial Hospital. Li vojaĝis konstante post tio, vizitante ĉiujare Usonon kaj Francion, ĉiam direktante kaj komponante. La **Kanto de Poeto de Jarcento XVIII** (*Canção do Poeta do Século 18*, 1953), la **Konĉerto por gitaro kaj orkestro** (*Concerto por Violão e pequena Orquestra*, 1951) kaj la **Verdaj domegoj** (*Green mansions*,

1958) por soprano kaj orkestro kun gitaro, estis liaj lastaj verkoj por gitaro. Li mortis la 17-an de decembro de 1959 en Rio de Janeiro, 72-jaraĝa.

5. La gitara muziko de Villa-Lobos.

Heitor Villa-Lobos ludis kaj komponis por gitaro multe da jaroj antaŭ li konis Andrés Segovia-n, al kiu li dediĉis siajn plej gravajn verkojn. Kelkaj el liaj gitaraj verkoj perdiĝis aŭ ankoraŭ ne publikiĝis. La Muzeo de Villa-Lobos listas la sekvantajn gitarajn komponaĵojn:

Jaro	Verko (Parto)
1899	Mazurka en Re
1900	Panqueca
1904	Valsa concerto n-ro 2
1908/12	Brazila popola sŭito (-mazurka-choro, -schotish-choro, -valse-choro. -gavota)
1910	Brazila kanto
1910	Dobrado Pitoresco
1910	Quadrilha
1910	Tarantela
1911	Mazurka simpla
1917	Mistika sesopo
1920	Choro 1-a
1925	Modinha
1929	Dudek studoj
1937	Disdono da floroj

1938	Ario el Bachiana 5-a
1940	Ses preludoj
1943	Melodia poemo el la 18-a jarcento
1951	Gitara Konĉerto
1958	Verdaj Domegoj

Tiu ĉi listo estas nur malgranda parto de la mirinda produkto de Villa-Lobos de pli ol du mil verkoj, kaj ĝi estas malpligrandigita de la fakto, ke kelkaj el tiuj artikoloj restas nepublikigitaj. Lia ega famo en *Gitario* kuŝas ekvilibre sur notinde limigita nombro de verkoj.

Sekvas priskribo de ĉiu komponaĵo laŭ kronologia ordo skriba:

5-1. Mazurko en Re.

Estas malkonsentoj pri kiu muzikaĵo Villa-Lobos verkis unue: **Mazurko en Re** aŭ **Pankeka**. Villa-Lobos mem konfuziĝis pri ĝi, sed li diris, ke kiun ajn li faris unue, ĝi estis lia unua muzika verko. La manuskripto perdiĝis.

5-2. Pankeka.

Manuskripto perdita.

5-3. Valsa concerto.

Tiu ĉi valso, kiu subtitoliĝas *Brila valso*, estis ree ludita de la grava hispana gitaristo Miguel Llobet (1878-1936). La manuskripto perdiĝis.

5-4. Brazila popola sŭito.

(Parizo, ed. Max Eschig, 1924): Mazurko-ŝoro; Valsa-ŝoro; Gavoto-ŝoro; Ŝorinjo.

La titolo de ĉi tiu Sŭito estas polemikiga (vidu noton 7-an). Ĝiaj 5 sekcioj konstruiĝis laŭ urbaj tradicioj de ŝoro ludita en Rio de Janeiro frue en tiu ĉi jarcento. Kompreneble, Ŝorinjo (ŝoreto) estis kreita malfrue en 1923 dum Villa-Lobos unue loĝis en Parizo. Tiuj pecoj estas tre simplaj kaj ne alportas apartajn aŭ gravajn novigaĵojn. La plej interna sento de la Gavoto, Valso, Ŝotiŝ kaj Mazurko estas nur reflektado de la karaktero de la muziko tiama, miksaĵo de brazila kaj eŭropa muzikoj, iam nostalgia, iam sprita.

5-5. Fantazia.

Manuskripto perdiĝis.

5-6. Ok duobladoj.

Dobrado (litere: duoblado) estas la plej popola muzika ĝenro en la Suda Regiono kaj oni aŭdas ĝin en najbaraj landoj, kiel Paraguay kaj Argentino. Ili estas rezulto de la unuaj aventuroj de Villa-Lobos en tiu regiono, tial ke **Paragvajo** volas diri “el Paraguay”, kaj *Paranaguá* estas haveno en la Suda Atlantiko, en la Ŝtato Paraná. La ceteraj titoloj esprimas sentojn, tial ke *Chorar* (pron. ŝorar) signifas “plori”; *Saudade*, saŭado, sopiro al io, kaj *Cabeçudo* (pron. kabetesudo), obstina. La manuskriptoj perdiĝis. La unuaj du estis simpligitaĵoj el tiuj verkitaj por blovorkestro en 1904.

5-7. Kanto brazila, Duoblado pentreska, Quadrilha kaj Tarentela.

Manuskriptoj perdiĝis.

5-8. Simploj (mazurko).

Tiun manuskripton, de nelonge malkovrita, li dediĉis al Eduardo Luis

Gomes, lernanto pri gitaro kun Villa-Lobos. Li verkis ĝin la 12-an de Aŭgusto de 1911 kaj enhavas tiun enskribon: *Tio estas studo; mi ne konsideras ĝin muziko serioza.*

5-9. Sesopo mistika. (Parizo, ed. Max Eschig).

La *Sesopo mistika* venas el tempo kiam la komponisto provis novan lingvon kaj evitis maksimume komunlokon. Villa-Lobos tiam ne konis pri ekspertoj de vienanoj. Tamen liaj verkoj havas nekutimajn kaj kuraĝajn harmoniojn. Ĝia instrumentaro, ankaŭ, estas tre interesa: gitaro, fluto, saksofono, klarneto, harpo kaj violonĉelo estas dividitaj en tri seninterrompaj tempoj.

En la unua tempo -Allegro non troppo (ĝoja ne troe)- gitaro estas fonto de muzika materialo. Modalajn motivojn enkondukas fluto, hobojo kaj saksofono. La instrumenta lokaĵo estas klara: tri melodiaj instrumentoj kontraŭ tri harmoniaj.

La *Adaĝo* (malrapido) kiu sekvas prezentas melodion tre ekzotikan por hobojo. Longaj notoj en fortaj partoj estas tre esprimivaj disonancoj (sepa maĵora, kvara grandigita kaj kvina grandigita), kiuj formas ĝian apartan karakteron.

La lasta *Preskaŭ Alegro* (quasi alegro) montras abundan uzon de paralelaj kvaraj kaj perfektaj akordoj en kromatika movo kaj grandigitaj akordoj ankaŭ.

La *Sesopo Mistika* premieriĝis la 12-an de Januaro en Rio de Janeiro, kun Turibio Santos je la gitaro.

5-10. Ŝoro I.

(Max Eschig, 1923). La **Ŝoron I-an** li verkis en 1920, kaj ĝi estas la unua el 14. Tiu ĉi estas stiligita versio de originala ĝenro de ŝoro, kiu deklaras en sia fronto amuzan karakteron kiu difinas la stilon, uzante kadenzon kaj neatenditajn rapidiĝantojn.



Harmonie Ŝoro 1-a sekvas strikte popolan modelon: unua sekcio en mi minora, dua sekcio en sol maĵora, kaj la tria denove en mi minora.

5-11. **Modinha** (modaleto, pron. modinja), estas la kvina inter liaj **Dek-kvar Serenadoj** verkitaj en 1925 en Parizo. Laŭ peto de Olga Prager Coelho, fama sopranino tiama, li malpligrandigis ĝin por voĉo kaj gitaro el originala por voĉo kaj piano. Villa-Lobos faris triptikon per ili, tiele: a) Senzalas (el tipaj brazilaj kantoj), Xango (same) kaj c) Kanto de Carreiro (el sia oka serenado). Manuel Bandeira, fama poeto, verkis la vortojn.

Tiun manuskripton ankoraŭ neniu publikigis.

5-12. Dekdu studoj.

(París, ed. Max Eschig, 1953).

Kvankam tiun ĉi kolekton li komponis inter 1924 kaj 1929, kelkajn el siaj ideoj kaj la ĝeneralan etoson la komponisto pripensis tre antaŭe. Iel kelkaj rimedoj estas tre proksimaj al popola akompano (studoj 4-a kaj 6-a). Aliaj pliproksimiĝas al klasikaj formuloj el la pasinta jarcento,


kiel tiuj de Carcassi, Carulli kaj Aguado (studoj 2-a, 3-a kaj 9-a). Ne antaŭ 1953 liajn **Dekdu Studojn** Eldonejo Max Eschig publikigis en Parizo, kaj tiu verko havas dediĉon al hispana virtuoza Andrés Segovia, kiu verkis ĝian enkondukon.

Studo 1-a (mi minora; allegro).

Studo pri senfina arpeĝo, kiu signifas, ke la dekstra mano ĉiam moviĝas same, dum la maldekstra mano esploras la fingrejon.

Studo 2-a (la maĵora; alegro).

Studo pri rompigitaj akordoj kaj ligoj. Tia rimedo oftigiĝis je la lasta jarcento, uzadate de Dionisio Aguado, Ferdinando Carulli kaj Mateo Carcassi, komponistoj profunde studitaj de Villa-Lobos je sia plej frua epoko. Je la fino de tiu ĉi studo estas tre interesa efekto farita de ambaŭ manoj.

Studo 3-a (re maĵora, allegro moderita).

Studo pri ligo. Ĉi tie ankaŭ estas tre forta influo de la gitarmuziko de la pasinta jarcento. Numero tri estas konsiderita inter tiuj de plej alta nivelo de malfacileco.

EKZEMPLO 4-A, STUDO 3-A.

**Studo 4-a (sol maĵora; malmulte moderita).**


Studo pri ripetitaj kvar-voĉaj akordoj, en kiu Villa-Lobos esploras tiun grandan riĉecon harmonian irante laŭ interesaj kadencoj kaj moduloj senpretigaj.

EKZEMPLO 5-A, STUDO 4-A.

**Studo 5-a (do maĵora; andanteto).**

Studo kontraŭpunkta. Ĝia enkonduko estas pedala en triaj baldaŭ sekvataj de modala melodio kiu memorigas nin pri *viola caipira* (vjola kajpira, kampara gitareto brazila), tio estas, kun granda melankolio.

EKZEMPLO 6-A, STUDO 6-A.


**Studo 6-a (mi minora; malmulte alegra).**

Alia studo pri akordoj. Estas tre klara influo de argentina tango en siaj harmonioj.

EKZEMPLO 7-A, STUDO 6-A.

**Studo 7-a (mi minora; animé).**

Tiu ĉi studo rangas inter tiuj kun pleja nivelo pri virtuoziĝo. La komenca skalo kaŭzas iaspecan streĉon laŭ ĝia transiro ĉe centra sekcio de la arpeĝo. Ĉi tiu dolĉa melodio, plena de brazila liriko, aperas je la unua kordo kiu finas en reekspono de skaloj, sed nun kunformita per tre fortaj ritmaj eroj.

**Studo 8-a (do diesa minora; moderita).**


Studo pri arpeĝo kaj ligo. La unua frazo aperas ĉe la basoj, kiam ĝi imitas ĉelon. la centra sekcio portas tiun saman melodion per soprano, kiun subtenas arpeĝo ĉe mezaj kordoj.

EKZEMPLO 9-A, STUDO 9-A.

**Studo 9-a (fa diesa minora; tre malmulte movita (trés peu animé)).**

Studo pri akordoj, ligo kaj arpeĝo. Ĝia monotoneco memorigas nin pri tre interna vivo de la kamparo, same kiel la studo 5-a.

EKZEMPLO 10-A, STUDO 10-A.

**Studo 10-a (Si minora, viva).**

Same kiel numeroj 2-a, 3-a, 7-a kaj 12-a, numero 10-a postulas pli altan teĥnikan nivelon pri virtuoziĝo, ĉefe ĉe sia meza sekcio, kiam pedalo de soprano subtenas melodion ĉe la basoj. Je la fino estas granda kreŝendo bazita sur afrikaj ritmoj.



Kantilena

unue pensis, ke ĝi sufiĉis. Sed nur post 1945 la aŭtoro aldonis alian parton, nomitan *Martelo*, kun vortoj de Manuel Bandeira.

Gitaro kaj J. S. Bach estis la du plej grandaj pasioj de Villa-Lobos. Tiel, en *Cantilena* li provis kunfundi tiun stilon harmonian kaj melodian de Bach kaj la ritmon de brazila sambodanco.




5-16. Kvin Preludoj.

(Parizo, Max Eschig, 1952).


Tiuj preludoj verkitaj de Villa-Lobos estis unuafoje luditaj parte en Montevideo en 1943, kiam Abel Carlevaro, urugvaja gitaristo, premieris nombrojn 3-an kaj 4-an. Entute, tiuj preludoj montras struktura dilemo, kiun la perdita sesa preludo povus moligi aŭ ne, se ĝin iam oni trovas. Ludita ope, tiu formo A/B/A ĉe Preludoj Unua, Dua kaj Kvara (Preludo Tria estas A/B/A/B kaj Preludo Kvina estas A/B/C/A) kaj limigita aranĝo pri tonaloj emas sufoki

spontanecon. Plua problemo estas, ke Preludoj aperas tehniko facilaj, kio gvidas interpretistojn en danĝeran teritorion. Multajn fojojn Villa-Lobos esprimis apartan afekton pri siaj Preludoj. Unue, li dediĉis ilin al *Mondinha* (Arminda Villa-Lobos, la edzino de la aŭtoro), kaj due, ili enhavas tutan aron de brazila tipa muziko kaj sento. Kaj ili ĉiuj havas plensignifan subtitolon, kiel ni vidos nun.


Preludo 1-a: *Melodio lirika, aŭ Omaĝo al kamparano.* Tiu unua preludo rangas inter la plej bonvenigitaj pecoj de ĝenerala aŭskultantaro. Tiuj paradoksoj ĉe la melodia linio estas desegno pri Brazilo kaj ĝia muziko. Ĝi melankolias, pikas, preskaŭ tristas, kaj samtempe ĝi optimismas, ĉiam kreskante, *diablante*, kiel Villa-Lobos kutimis diri. La dua sekcio portas rimedon elprenita el *violono kajpiro*:



Preludo 2-a: *Melodia capadocia, aŭ Omaĝo al kanajlo.* Simile al **Choro 1-a**, ĉi tie melodio apartenas al harmonio, emfazante tiun balancecon de originala brazila ŝoro. Villa-Lobos preskaŭ karikaturas ĝin per sia troigata rubato je la komenco mem. Ĉi tie la kadenco T-DD-D estas plej komuna ĉe popola ĝenro. Ankaŭ tiu melodio estas simpla imitado de klarneto de ŝora grupo, kutime malsuprenirante ĝis la meza parto.



Alia interesa punkto estas la dua sekcio en la Preludo. La konstanta arpeĝo trovita ĉi tie estas bazita en la sama ritma kombinaĵo kiun oni trovas en karnavalaj kantaraj en kelkaj regionoj el Brazilo.



Preludo 3-a: *Omaĝo al Bach.*

Ni diris antaŭe, ke Bach kaj gitaro estis la du plej grandaj pasioj de Villa-Lobos, kaj tio povas esti vidita klare ĉe la du-sekcia Preludo 3-a. La unua havas vertikalan strukturon, inkluzivante akordojn kaj arpeĝojn. La dua estas malsupreniranta melodio kun soprana pedalo, kio estas konsista baroka rimedo. Tial, oni povas konsideri ĝin kiel formon tokatan, kiu eksplikas tiun subtitolon *Omaĝo al Bach*.



Kompreneble, Villa-Lobos ne povis antaŭvidi estonton, sed lia aparta sesa senso antaŭis je dudek jaroj la *Bossa Nova*-n.

Preludo 4-a: *Omaĝo al brazila indiano.*

Tiu riĉeco de Villa-Lobos estas bazita sur mikso da muzikaj eroj. Li ŝuldis ĝin al tia edukado, kian li ricevis, kiu malfermis al ĉiu kulturaj manifestacioj. Lin ĉarmis aparte la Amazona Arbaro, ĝiaj rakontoj kaj kulturo indiana. La ĉefa temo, per sia simpleco, elvokas pri la indiano.



Post rapida arpeĝo je la dua sekcio, Villa-Lobos re-prezentas la unuan temon, sed nun per harmonikoj:



Preludo 5-a: Omaĝo al socia vivo. Plej popola ritmo en Brazilo estis tiam, sendube, valso. Oni ludis ĝin ĉie, ĉiufoje, de ĉiuj. Klasika ekzemplo de popola valso estas *Rosinha*, de João Pernambuco. Villa-Lobos ne nur atentis pri ĝi, sed ankaŭ pagis omaĝon al tiuj muzikistoj per sia valso. Ĝi estas ne nur valso, sed ankaŭ valso-ŝoro.



5-17 Konĉerto por gitaro kaj orkestreto.

(Paris, Ed. Max. Eschig, 1955). La konĉerton gitaran li kompletigis en 1951, originale formiĝante kiel ***Fantazio Konĉertanta por gitaro kaj***

orkestreto. Andrés Segovia petis Villa-Lobos-n, ke li aldonu kadenzon inter la dua kaj tria partoj, kaj tiel la peco iĝis Konĉerto laŭ ĝia vera senso. Pri la konĉerto, Villa-Lobos skribis:

*La **Fantazion** **Conĉertantan** mi verkis por gitaro kaj orkestro eta kaj ekvilibrita, serĉante tembrojn, kiuj ne povis nuligi la solistan sonecon. Mi organizis ĝin en tri partoj: **Allegro Preciso**, **Andantino/andanto**, kaj **Allegro non Troppo**. La unua parto (*Allegro preciso*, tio estas rapido ekzakta) okazas ĉe la orkestro kaj montras temon plenan de energio, kiu reaperos kaj ĉe gitaro kaj ĉe orkestro. En la dua sekcio (**Poco meno**, tio estas, malmulte malpli rapide), la temo estas tute originala kaj muĝe iras en novan epizodon. Ĝi daŭrigas tiun melodian etoson de popoleskaj kantoj el nordorienta parto de Brazilo. Tuje, oni reludas la unuan temon kun la sama ritma strukturo de la komenco, sed en tria minora supren; disvolvo kaj streto ne aperas ĝis la lasta aĉelerando. Ĉe la andantino, post mallonga enkonduko de la orkestro (samtempaj skaloj en kontraŭaj movoj), la ĉefa temo reaperas kaj disvolviĝas ĝis la Andanto. Tie, nova epizodo aperas dum kelkaj taktoj (6/8), same kiel la enkonduko, ĝis la esprimiva melodio ludita de gitaro. Reveno de Andantino estas je kvina super la ĉefa*

*ekspono kaj la piú mosso (pli movita) kun alia melodio ol tiuj de la tema unueco, reprezentas specon de streto, kiu konkludas la parton. La Allegro non troppo (rapido ne troa), kun enkonduko de kelkaj taktoj (melodiaj kaj sinkopadaj ritmoj) montras orkestran temon, kiu baldaŭ reaperas ĉe gitaro. Ĉirkaŭ la fino de la **Fantazio** multaj moduladoj esploras la virtuosismon de la gitarludanto.*


Ni povas konsideri la Konĉerton densigo de tiu gitarverkado de Villa-Lobos. Erojn antaŭajn esploritajn per Studoj kaj Preludoj oni facile povas trovi ĉi tie.

Noteto. Tiu manopo da postvivantaj gitaraj pecoj de Villa-Lobos estas eta, kaj ni dezirus, ke ili estus pli multenombraj. Aparte oni povus preni tiujn eklektikajn erojn videblajn ĉie en lia verkaro, kaj tiu preno provus esti fruktodona ene de la kunteksto de la muzikilo. Villa-Lobos, super ĉiuj aliaj gitarkomponistoj de la Dudeka Jarcento, posedis sparkon sufiĉe fean por konstati kiom malproksime la instrumento povus esti eltirita tehniko kaj muzike. Li diris iam: *Mia instruisto...? Brazilo!*



La spirito de Majo 1968

de Antonio Marco Botella



Antaŭ 30 jaroj okazis en Francio unu el tiuj sociaj fenomenoj enorme transcenda kaj originala, kiuj malfermas novan epokon en la homaj interrilatoj, saltante landlimojn kaj impaktante en la sino de la plej progresemaj popoloj. Mi aludas al tiuj eventoj ankoraŭ ĝis nun konataj per la simpla paragrafo *okazaĵoj de Majo/68*. La fenomeno estis tiel potenca kaj grava, ke kvankam la franca ŝtato restis dum du tagoj sen ŝtatoĉefo (neniu sciis kie sin trovis generalo De Gaulle) kaj malgraŭ la mano de la politika kaj efektiva povo, neniu politika formacio intencis okupi ĝin. La tuta lando estis paralizita per strikoj (dek milionoj da strikantoj), kaj la studentoj okupis la parizajn kaj provincajn universitatojn.

La okazaĵoj pli gravaj ŝprucis kvazaŭ spontane kaj absolute neatendite, sub formo de nebremsebla profesto-ondo de studentoj kaj laboristoj, en la Latina Kvartalo de la franca ĉefurbo, kvankam vero estas, ke de la jarkomenco sporadaj ne gravaj strikoj aperis dise en diversaj urboj de la lando. En majo la situacio eksplodis: la studentoj, po centoj kaj centoj, okupis la oficialan teatrojn kaj kulturajn centrojn, kaj ĉe multnombraj fakultato-aŭloj ili enfermiĝis kiel protestosigno, kontraŭ batalis la policon ĉe barikadoj sur stratoj, kaj kiel brila elmontro de la alta kultur-nivelo de tiu movado, oni improvizis en multnombraj lokoj podiojn, de kie oni teoriis kaj debatis pri idearoj: politikaj, sociaj, kulturaj, priinstruaj kaj mil aliaj ideoj

apenaŭ imageblaj en la mensoj de la rutinaj politikuloj. Kaj tio, en medio de absoluta toleremo kaj frateca etoso, kvankam ne ĉiuj samopiniis. En la *liberigita* Sorbono, studentoj kaj laboristoj debatis pri nova kaj pli progresema socio. En la aŭloj, kie enfermiĝis studentoj kaj profesoroj, oni prilaboris planon surbaze de demokratiaj principoj kaj moderna instruado. Ĉe la gimnazioj, la lernantoj imitis la studentojn kaj ankaŭ ili *okupis* la liceojn. Aktive, ili partoprenis kun siaj profesoroj en politikaj debatoj.

La movado ŝajnis pli ol multetna lukto de francaj kaj el diverslandaj studentoj koincidantaj en komuna celo, revolucionan batalon, ĉar ĝi havis en ĝia kerno ion esencan en la naskiĝo kaj efektivigo de tiu protesto, la deziron starigi liberon en ĉiuj aspektoj de la ĉiutaga vivo: liberon por ne akcepto de malpermesoj; liberon por la interkomunikado kaj por debato sen limoj pri io ajn; la rajton libere pensi ne gravas pri kio ajn; interfratiĝon trans landlimoj kaj postulo al plenumo de homaj rajtoj, kaj kiel suprema lemo de tiu movado *la malpermeson malpermesi*.

La tuta progresema mondo tuj konstatis la aŭtentan sencon de tiu movado: rompi la barojn de konformisma socio kun tro da tabuoj: detruu la materialismon kaj konsumemon de multaj homoj de okcidento, tre inklinaj akcepti ĉion ŝanĝe de rezigno de ideoj kaj principoj politiko-sociaj. Temis, precipe, pri la

malfermo de ĉies mensoj al la lemo dum tiuj tagoj trimfantaj: *la malpermeso malpermesi*. Eĉ en Hispanio regata de la Franko-reĝimo, kie rigida cenzuro kaj ĉiopova polico malpermesis eĉ ekpensi, la universitatoj de Madrido, Bilbao kaj Seviljo reagis solidarece kun la parizaj studentoj per protesto-manifestacioj. Post tiuj tagoj, en la moderna Eŭropo, jam io ajn ne plu restis kiel ĝis tiam, kiam estis absolute ne eble eskapi eĉ al la plej stultaj malpermesoj...

Kiu estis la rikolto de tiuj tagoj de Majo/68? Retrospektiva rigardo ebligas al ni konkludi pri konkretaj konkeroj: la sekvanta generacio veninta post tiuj tagoj formiĝis en la ne-akcepto de la ĝistiamaj malpermesoj, en la libero de kutimoj, egaleco interseksa, konscio pri la homaj rajtoj de la individuoj sen distingo de raso aŭ koloro, kaj aliaj ideoj pri solidaro kaj frateco inter homoj kaj popoloj.

Malfeliĉe kun la forpaso de la tempo multaj el tiuj konkeroj paliĝis kaj novaj generacioj formiĝis vole ignorante tiujn principojn, en kiuj edukiĝis la filoj de tiuj kiuj vivis nla menciitajn eventojn: kaj en tiu linio ni konfesas nian frustracion kiam, antaŭ ne longe, oni povis legi en la ĵurnaloj, ke pli ol 5 000 junaj nazioj kunvenis en germana urbo proklamante hororan mesaĝon pri netoleremo, ksenofobio kaj malamo. En aliaj okcidentaj landoj, ankaŭ la radikala dekstrularo, kvankam minoritata, montras sian veran vizaĝon ekzaltante naciismojn kadukajn kaj flirtante la flagon kontraŭ ĉiuj liberoj kaj homaj rajtoj. Eĉ kun malĝojo, mi legis antaŭ ne longe en unu el niaj esperantistaj gazetoj, aĉajn frazojn kontraŭ idealistaj homoj de niaj propraj vicoj, ĉar, laŭ tiu individuo, oni devus rezigni batali kontraŭ tiuj krimuloj,

kiuj pro naciismaj prijuĝoj kaj obstina malsolidaro, negas ĉiajn rajtojn al malriĉuloj, forbrulas domojn, murdas homojn kaj benas ĉiajn krimojn pro rasismo kaj ksenofobio aŭ starigo de landlimoj kelkaj metroj pli proksimaj aŭ malproksimaj. Estas kurioze, ke kiam en Eŭropo certaj landoj, eĉ kun burĝa menso, rezignas pri siaj respektivaj suverenecoj kaj forskuas landlimojn, tiuj fanatikuloj el pasinto, je la nomo de la *patrio*, mortbatas almozulojn, eksterlandanojn aŭ junajn antifaŝistojn..., ĉu tio la verkanto de tiu aĉa artikolo nomas *rancan kruc-miltonkontraŭ la naciismo*? Ĉu li nomas *rancajn* la raciaj homoj kiuj abomenas de tiuj barbaraj faktoj okazintaj/okazan5taj eksterlande, aŭ en niaj urboj, antaŭ unu, du, tri jaroj, unu monato, hieraŭ, hodiaŭ? Kie, laŭ vi, situas la vera malamiko? Kial vi, klare, ne denuncas ĝin?

Al tiuj homoj *toleremaj* kun la reakcio, kiuj akceptas pasive ĉion, eĉ la mezepokan kadukan ideon pri la naciismo, mi adresas ĉi tiun artikolon. Tiu sinteno estas ĝuste; la kontraŭo al la spirito de Majo/68!

La verko de ĉi tiuj linioj, elvokante la spiriton de la memorinda printempo de 1968, ne havas alian celon ol reliefigi la homamajn valorojn tiam konkeritaj, kiuj ne povas pereii, ĉar fundamentaj en la konsisto kaj esencoj de la homa evoluo, estas eternaj. Samtempe, gravas emfazi al certaj burĝaj mensoj, ke ene de la deviga respekto al ĉies opinioj, oni ne povas flirti kun la ideoj kvazaŭ temus pri infana ludo, aprobi aŭ malaprobi nur kaprice, ofte temas pri perversaj ideoj perfekte enmaskitaj per modernaj prezentoj.

Saluton, do!, al la spirito de Majo/68.

Antonio Marco Botella,

Reproductebla en *Sennaciulo*.

Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

**REDAKCIO: Poŝtkesto 4461,
E30080 MURCIA,
HISPANIO**

**Retskribu al
hale@distrito.com**

<http://www.distrito.com/esperanto/kajeroj.htm>

<http://www.dragonfire.net/~Esperanto/kajeroj.htm>



Omaĝe al Giordano Moya Escayola

Depósito legal: Z-2398-88

Presejo: Alegría.